PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Taschenwörterbuch
Esperanto-Deutsch
de d-ro Krause , la
plej nova vortaro
en Germanlingvio

6,50 GM
=======

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69



N-ro 38/1975 28 oktobro 1975
Aperas ĉiusemajne

## Pri la agado de la UEA-prezidanto

**Rotterdam** (pp) - Inter la 25-a de septembro kaj la 19a de oktobro la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, kiu nuntempe loĝas en Anglio, vizitis Finnlandon, Sovetunion, Svedujon kaj Danlandon, kie li faris prelegojn en Esperanto kaj angla lingvo.

La vojaĝo realiĝis sen ŝarĝo al la buĝeto de UEA, ĉar la kostojn pagis la diversaj invitantoj, esperantistaj kaj ne-esperantistaj, aŭ la preleganto mem.

Antaŭ sia foriro al Finnlando d-ro Tonkin parolis pri la agado de UEA ĉe Interfederacia Renkontiĝo de Brita Esperanto-Asocio en Reading, la 21 sep.

De la 27 sep ĝis la 9 oktobro la prezidanto de UEA restadis en Finnlando. Li partoprenis la Aŭtunan Konferencon de Esperanto-Asocio de Finnlando, kiun ĉeestis ĉ. 250 esperantistoj. Dum la Festa Vespero d-ro Tonkin parolis antaŭ ĉ. 300 personoj pri la Planado por la Estonteco en la Esperanto-Movado (27.9.) El la samtaga gazetara konferenco fontis pluraj ĵurnalaj artikoloj kaj radioelsendo. La diskuton pri la nuna stato de UEA, kiun Tonkin enkondukis, ĉeestis 120 personoj. Krome li parolis kadre de la aŭtuna konferenco en Kuhmo pri la Financa Programo kaj pri Eksteraj Rilatoj de UEA en ĉeesto de 35 personoj.

Dum sia ripozado en Kuhmo d-ro Tonkin estis i.a. ankaŭ gasto de la Komunumestro de Kuhmo. Krome li havis konversacion kun Erkki Aho, estro pri studprogramoj de la finna lerneja sistemo.

La 1-an de oktobro la UEA-prezidanto parolis pri Esperanto en la Kristana Instituto de Jyväskyla en ĉeesto de 40 personoj. La E-paroladon tradukis en la finnan s-ino Torttu Tyynelä. Okazis ankaŭ intervjuo ĉe la ĵurnalo de Jyväskyla.

La 2-an de oktobro d-ro Tonkin prelegis en angla lingvo pri la Poezia Lingvo en Esperanto en la lingva fako de la Universitato de Jyväskyla; ĉeestis 6 personoj. Samtage li faris paroladon pri Lingva Diverseco kaj Lingva Unueco en la Laborista Instituto de Tampere en ĉeesto de 65 personoj; interpretis s-ro Pentti Järvinen.

La 3-an de oktobro la paroladon pri Lingva Diverseco kaj Lingva Unueco aŭskultis 20 personoj en angla lingvo ĉe la Lingva Instituto de Tampere (Lernejo por tradukistoj kaj interpretistoj).

La 5-an de oktobro okazis akcepto ĉe Ambasadorino Tyyne Leivo-Larssen en Helsinki. En Helsinki okazis du prelegoj. Unu en Esperanto antaŭ 400 personoj en liceo Helsingin Suomalainen Yhteiskoulu kun traduko fare de d-ro Vilho Setälä. Alia prelego pri la Uzado de Alegorio kaj Lingvo ĉe Spenser anglalingve en la Angla Fako de la Universitato de Helsinki okazis antaŭ 15 personoj.

D-ro Tonkin estis akceptita en la urbodomo de Helsinki de urbestro Loimaranta. La 7-an de oktobro okazis lunĉo kun reprezentantoj de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj.

Pri la Agado de la UEA-prezidanto (daŭrigo)

La 8-an kaj 9-an de oktobro la UEA-prezidanto restadis en Turku. En la Instituto pri Edukado de la Universitato de Turku li parolis antaŭ 20 personoj pri Supera Edukado en Usono; ĉeestis 20 personoj; tradukis Jorma Ahomäki. Antaŭ 40 personoj okazis la parolado pri Lingva diverseco kaj Nia Estonta Agado en la Esperanto-Klubo de Tampere. Okazis gazetara konferenco, intervjuo kaj Radio-intervjuo.

D-ron Humphrey Tonkin akompanis lia edzino, Julie. Ŝi prelegis pri "Vojaĝantaj Sinjorinoj en la 19-a Jarcento" dum la konferenco en Kuhmo, en la Urba Biblioteko de Kuhmo, en la Urba Biblioteko de Tampere, en Helsinki, kaj en la Angla Fako de la Universitato de Turku.

La 10-an de oktobro la UEA-prezidanto parolis antaŭ 30 personoj pri la Agado de UEA en la Esperanto-Societo de Leningrad, Sovetunio.

Post tri tagoj d-ro Tonkin parolis en la Grupo Esperantista de Stockholm en ĉeesto de 100 personoj pri "Niaj Estontecoj". Ankaŭ en Stockholm okazis ĵurnala intervjuo, kun "Expressen".

La 15-an de oktobro d-ro Tonkin gastis en Kopenhago, kie li parolis en la Konversacia Esperantista Klubo pri "Niaj Estontecoj" antaŭ 30 personoj. La saman prelegon li faris en la Esperantista Klubo de Malmö, kie ĉeestis 60 personoj. Ankaŭ en Malmö okazis gazetara intervjuo.

La 17-an de oktobro la UEA-prezidanto kunsidis en la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam kun la redaktoro de Revuo, s-ro Milojević kaj la estraranoj Wensing kaj Woessing, pri aktualaj demandoj.

Antaŭ sia reiro al Anglujo d-ro Tonkin vizitis la semajnfinan renkontiĝon de la Nederlanda Esperanto-Junularo, kiun Pilo-Press cetere anoncis.

Pri la prelegoj en Finnlando cetere raportis jam la Esperanto-Elsendoj de Pola Radio per korespondaĵoj de redaktoro Andrzej Pettyn, kiu tiutempe ankaŭ restadis en Finnlando, kiel ni jam informis.

Aperis multaj, parte ilustritaj, gazetartikoloj. La paroladojn de d-ro Tonkin ĉeestis entute preskaŭ 1 300 personoj.

*****************

Esperantista Skiferio

Adelboden (pp)- Por la 19-a fojo okazos en Adelboden esperantista skiferio, de la 26-a de decembro 1975 ĝis la 5-a de januaro 1976. El la programo: Skiado, sketado, skikursoj por komencantoj, mezskiantoj kaj spertuloj, komunaj ekskursoj, vesperoj kun prelegoj, diskutoj, festoj, ludoj ktp.

Partoprenkotizo: Por lernantoj, studentoj, metilernantoj, infanoj 240 sfr.; por plenkreskuloj 290 sfr. La kotizo inkludas loĝadon, manĝojn, trinkaĵojn, ski-kursojn, aŭtobusan kaj telferan veturojn dum la 4 komunaj ekskursoj. Petu detalan informilon de Kultura Centro Esperantista, Poŝtfako 621, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

+++++++++++++++

El Popola Ĉinio, la ilustrita Esperanto-revuo el Ĉinio, varbas novajn abonantojn por 1976 kaj ceteraj jaroj!

Abonkotizo por 1 jaro: 6 GM; por 2 jaroj 9 GM; por 3 jaroj 12 GM

Abonu ĉe Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113
PSchK Nürnberg 819 56-851

Esperanto-Kafejo en Trier

Trier (pp) Nome de Luksemburga Esperanto-Asocio Robert Hoegener, Esch-sur-Alzette informas, ke ekde kelkaj semajnoj en Trier, Saarstr. 87, ekzistas Esperantokafejo kaj diskoteko "Esperanto". La 29-an de septembro ĉirkaŭ 12 esperantistoj el Luksemburgio, Wittlich kaj Trier kunvenis tie kaj aŭskultis al vesper- kaj propagandkantoj. En ĉarma atmosfero oni travivis neforgeseblan vesperon sub gvido de pastro Kindler, kiu jam famiĝis kiel magiisto TRIXINI.

Esperantistoj el ĉiuj landoj, speciale el Germanio, estas petataj subteni la novan Esperanto-kunvenlokon. Sendu salutkartojn al Kafejo Esperanto, Saarstr. 87, D-55 Trier, FGR. Se vi venos en la proksimecon de Trier, ĉe la landlimo al Luksemburgio, vizitu la kafejon!

Sukcesaj prelegoj

Elne, Francio (pp) - 80 gelernantoj de la kolegio en Elne ĉeestis la prelegojn de René Llech-Walter, honora prezidanto de UFE, delegito de UEA, la 17-an kaj 24-an de oktobro 1975.

Kaptante la okazon ke s-ro Canonne, prezidinto de la E-grupo Valenciennes (Nord-Francio) kaj emerito, nun loĝas en Elne, s-ro Llech-Walter anoncis malfermon de Esperantokurso la 7-an de novembro en la kolegio de Elne. Tuj 40 gelernantoj enskribiĝis.

Por la plenkreskuloj loĝante en Elne oni antaŭvidas publikan prelegon kaj kursojn.

Denove montriĝis bonega agado en la kadro de la Federacio "Langvedoko-Rusiljono" kies prezidanto estas la delegito de UEA en Perpignan, Llech-Walter.

Jarkunveno de EC Dr. Zamenhof

Hamburg (pp) - La 9-an de oktobro 1975 okazis la jarĉefkunveno de la registrita societo Esperanto-Centro Dr. Zamenhof, kies celo estas la kreo kaj funkciigo de Esperanta Kulturdomo en FRG.

El la raportoj sciiĝis, ke la societo nun havas 32 membrecojn posedatajn de 29 akciuloj. Ĝis nun estas enspezitaj 27.311,49 GM kaj elspezitaj 2.646,42 GM, ĉefe por preso kaj disdono de prospekto kaj statutoj.

Interesuloj, kiuj volas fariĝi membro de tiu "akcia" societo kun kotizo-pago de 1.000 GM, turnu sin al Milan Sudec, 2 Hamburg 76, Wandsbeker Chaussee 155.

Abonu nun por 1976!

| | |
|---|---|
| Eŭropa Esperanto-Revuo, 8 numeroj po-jare | 16,-- GM |
| Pilo-Press, ĉiusemajna informservo en Esperanto | 30,-- GM |
| kun germana eldono END | 40,-- GM |
| HEROLDO DE ESPERANTO , Duonmonata organo de la Esperanto-movado | 25,-- GM |
| JUNA AMIKO, Internacia lerneja Esperanto-revuo 3 numeroj po jaro | 3,-- GM |
| Homo kaj Kosmo, populara naturscienca revuo 4 numeroj po jaro | 6,-- GM |
| Biblia Revuo, trimonata internacia gazeto pri bibliaj kaj orientaj studoj | 20,--GM |

Ludwig Pickel, Libroservo, 85 Nürnberg, Postfach 2113

## Esperanto en la radio

### Feliĉa Aŭstrio

Vieno. En sia elsendo de la 25/26 oktobro la Esperanto-Redakcio de ORF memorigis pri du datrevenoj: "20 jaroj de Ŝtatkontrakto" kaj la 150a datreveno de la "reĝo de la valsoj" Johann Strauss, filo. Pri la unua datreveno okupis sin la semajna komentario de d-ro Alfred Macher, kiun ni ĉi-sekve publikigas:

"Aŭstrio solenas sian nacian festotagon nek per militistaj paradoj nek per amasaj demonstracioj, sed per rekonsciiĝo pri siaj naciaj valoroj. La 26-a de oktobro 1955 estis la unua tago de nia vera, memstara libereco, kiam la lasta soldato de la okupaj potencoj estis forlasinta nian teritorion.
Ni estas memstaraj ankaŭ pro tio, ke ni ne apartenas al iu alianca bloko. Temas ekstere pri "20 jaroj de ŝtatkontrakto - 20 jaroj de neŭtraleco", interne pri demokrata maturiĝado, sukcese finita. Ambaŭ parlamentaj partioj pruvis, ke ili obeas la demokratajn regulojn, eĉ kiam ili disponas pri absoluta plimulto. Estimante sin reciproke, ili kunlaboradas, ankaŭ se ne ambaŭ partoprenas en la regado samtempe.

Ideale kunlaboradas, tute libervole, la reprezentantoj de la dungintoj kun tiuj de la dungitoj: la sociaj partneroj. Preskaŭ ĉiam ili komune solvas niajn ekonomiajn problemojn. Rezultis 20 jaroj de progreso, de maksimuma konjunkturo. Kontraste al aliaj industrinacioj la aŭstroj estas - malgraŭ iuj malfaciloj - praktike plenokupitaj.

En sia ekstera politiko Aŭstrio estas aktive neŭtrala, partoprenas en ĉiuj internaciaj organizoj kaj pacmisioj. La aŭstro Kurt Waldheim estas ĝenerala sekretario de UNO, kanceliero Bruno Kreisky diskrete agadas en tiuj sektoroj de la mondpolitiko, kiuj aspektas por Aŭstrio speciale signifaj. Do la multnombraj internaciaj renkontoj en nia lando: de la ministroj Gromyko kaj Kissinger, de la prezidentoj Ford kaj Sadat, de la gvidantoj de la cipraj gentgrupoj.

Vieno estas la daŭra sidejo de la UNO-organizo por industria evoluo, de la internacia komisio por atomenergio kaj de la OPEC, t.e. la organizo de la petroleksportantaj landoj.
Tiuj rezultoj de 20-jara evoluo certe konvinkos ĉiujn aŭstrojn, ke ili nepre pluiru la saman vojon ankaŭ estonte."

*************

Berno. Ges-roj Gacond daŭrigis sian prelegserion pri "Literatura Mondo" kaj d-ro A. Baur rakontis pri vinkulturado en la kantono de Ĝenevo.

Varsovio. Dum la pasinta semajno la radian ĵurnalon ĉiutagan prizorgis Barbara Pietrzak. La Esperanto-Ekspreso aŭdigis ampleksan rubrikon "Niaj aŭskultantoj sciigas", Esperanto-kanzonojn kaj denove memorigon pri la mortinta Jan Zawada. - En la ombro de la ĉiutagaj Esperanto-elsendoj el Varsovio aŭdiĝas la ĉiudimanĉa Esperanto-anguleto kadre de la germana programo, je la 22a horo (ĉ. 22,25 horo). Ĉi-dimanĉe la anguleto estis relative bone aŭdebla kaj temis pri la nova bulteno de GEA "Esperanto en FRG". Jerzy Grum tre pozitive recenzis tiun bultenon, kies unua numero aperis fine de septembro.

****************

Antaŭ 50 jaroj: Ondo 1300 el Königswusterhausen

"Estimataj aŭskultantoj! Antaŭ ok tagoj mia disaŭdigo bedaŭrinde estis ĉesigata de fulmotondro. Ĵus mi estis parolanta pri nia dekkvara Germana Esperanto-Kongreso, kiam tondro ekkrakis, fulmo eklumis, - mi devis rezigni je plua parolado..." Citaĵo el Germana Esperantisto n-ro 8/9-1925 p. 177.